# Libroapogo al UnuiÄ•o de Zagrebaj Esperantistoj

Aldonita de Josip Pleadin
09/01/2009

Ses bibliotekoj ricevis subvenciojn de Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen je la suma valoro de 1250 eÅ-roj. La subvencioj estas donataj kiel libroj laÅ- la dezirlistoj, kiujn la bibliotekoj sendis kun siaj petoj. Per decido de la estrarano de UEA pri kulturo Claude Nourmont kaj Ä•enerala direktoro Osmo Buller estis subvenciitaj la librokolektoj de Srilanka Esperanto-Asocio (265 eÅ-roj), UnuiÄ•o de Zagrebaj Esperantistoj (Kroatio; 260 eÅ-roj), Centro Internacia de Esperanto (Madagaskaro; 200 eÅ-roj), Esperanto-klubo de Elec (Rusio; 190 eÅ-roj), Triesta Esperanto-Asocio (Italio; 175 eÅ-roj), kaj Esperanto-Biblioteko de Limogio kaj Okcitanio (Francio; 160 eÅ-roj). UnuiÄ•o de Zagrebaj Esperantistoj kandidatis por la subvencio favore al Dokumenta Esperanto-Centro (DEC).

Komence de januaro la libroj el Roterdamo atingis kaj grave pliriÄ‰igis la kolekton de DEC.